

N°172
octobre
novembre
décembre
2015

LA INFORMILO

N° 172
oktobro
novembro
decembro
2015

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

ESPERANTO
2015
Justa Komunikado

Esperanto
la lingvo de l'amikeco
sen landlimoj

esperanto
France-Est

Centre de Loisirs d'Art sur Meurthe

ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale

ESPERANTO

regroupant
les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 15€

Reta abono: 7,50€



Notre stage de printemps à Art-sur-Meurthe

Du 22 au 24 avril 2016 vous pourrez participer à notre stage de printemps à Art-sur-Meurthe, à quelques kilomètres de Nancy. Le séminaire de littérature sera animé par l'éminent espérantophone Istvan ERTL, traducteur et interprète à la Cour des Comptes Européenne à Luxembourg, collaborateur de nombreuses revues (Literatura Foiro, Beletra Almanako, La Ondo de Esperanto, Kontakto). Une guide touristique professionnelle de Verdun parlera de la Première Guerre Mondiale. Vous pourrez également vous initier à l'espéranto, même avec vos enfants, ou améliorer la pratique orale de la langue.

La chanteuse russo-suédoise Nataša BERTSE présentera son répertoire de chansons en espéranto et vous aurez l'occasion de découvrir bien des trésors touristiques de la région.



Vous pourrez aussi vous entretenir avec Catherine HEL, auteure de Momo La Histriko, un conte pour enfants rédigé d'après une idée d'Elina GREINER, la fille de notre ami espérantiste Gérard GREINER. Notre bulletin LA INFORMILO vous présente cette charmante histoire en avant-première. Au plaisir de vous revoir à Art-sur-Meurthe !



Momo, la Histriko

Verkis Catherine Hel, laŭ originala ideo de Elina Greiner, ilustrita de E. Greiner.

Iam estis juna histriko, kiu nomiĝis **Momo**. Li estis tre bela, fortika kaj pacema virbesteto. Kvankam estante ankaŭ amikiĝema, li tamen estis sola. La kaŭzo de lia soleco kuŝas en tio, ke ĉe ĉiu histrika dorso troviĝas longaj pingl-haroj. Tiaj danĝeraj haroj ne faciligas la proksimiĝon inter samspeculoj. Kaj vundi iun, **Momo** tute ne volis.

Vivante en granda arbaro, li tagdormis somere sola en truo kavigita de li, aŭ en arbo-truo jam borita; kaj somere li sekure sin kuŝis sur arbobranĉo, tute kaŝita inter densfoliaj arboj.

Nutrante sin nur per radikoj, fruktoj, amentoj, kiujn li trovis trotante tutnokte tra la arbaro, la juna histriko estis malkontenta pri aliaj, kiuj manĝadis ankaŭ florojn. Opiniante, ke pro ilia grandega beleco neniu konsumu florojn, la jenon al siaj gefratoj kaj geamikoj li firme ripetadis: "Admiru kaj amu ĉi tiujn mirindajn plantojn, neniam manĝu ilin!". Sed, bedaŭrinde, gefratoj kaj geamikoj liaj neniam ankoraŭ priatentis la admonon.



Estis iu noktiĝa vespero.

Subite **Momo** tute ĉesis momente moviĝi: "Ĝustan planon mi ĵus elpensis!", li diris al si mem. Jam antaŭ longe li deziris malkovri belajn florojn, kiuj onidire estas sub la suno ankoraŭ pli belaj kaj pli multaj ol meze de la arbaro, sed

ĝis nun li ne trovis en si mem sufiĉe da forto kaj deziro por la decidiĝo elarbariĝi. Hodiaŭ, preta, li laŭte ekpensis: "Mi tuj foriru!".

Alirante al siaj gefratoj kaj geamikoj, post rapida preparado de kelkaj vojaĝaĵoj, la juna histriko sentis sin feliĉa, kaj tute malpeza, kvazaŭ florpetalalo en venteto.



Liaj gefratoj kaj geamikoj ne komprenis, kaj lin demandis: "Kial tiel subite?", "Kial jam ĉi-nokte?", "Kien vi iros?", "Kiom da tempo vi malĉeestos?", "Kial vi volas tiom renkonti aliajn belajn florojn?", "Kion vi manĝos?", "Ĉu vi ne plu amas nin?", "Kio mankas al vi ĉi tie?", "Kiu...?".

Por ĉesigi la pridemandadon, **Momo** alparolis al ĉiuj per emocia voĉo: "Trankviliĝu, mi petegas! Ĉit! Ĉit! Bonvolu silentiĝi! Vi ĉiuj jam scias, ke ĉi tie mi estas tro soleca, kaj ofte enuas.", li klarigis. "Eble la vojaĝo estos malfacila al mi, sed mi ja devas foriri, por malkovri aliaĵojn kaj konatiĝi kun aliuloj!", li daŭrigis, kaj aldonis: "Novaĵojn mi alportigos al vi kiel eble plej ofte. Ne zorgu pri mi, mi estos singarda, kaj neniam mi vin ĉiujn forgesos, vi ĉiam estos miaj familianoj kaj geamikoj. Ĝis la revido!".

Kun saketo da aveloj sur ŝultro **Momo** aventuren eliris el la arbaro, sen rigardi returnen.

Post dutaga piedirado **Momo** nun estis for de la arbaro.

Estis suna somera mateno. Sunlumo eksekigis herbojn kovritajn de roso, kaj sur helblua ĉielo flugadis gaje multaj pepantaj birdoj. Ĉio plaĉe mirigis la junan migranton.

Alproksimiĝinte al rando de kampo, **Momo** estis admiranta belan ruĝan floron:

- Kia bela floro vi estas! Kiel vi nomiĝas?
- Skarlata, la Papaveto!, ŝi respondis. Kaj vi?
- **Momo**, la Histriko!
- Ho! Vi estas la unua histriko, kiun mi vidas.
- Ho! Vi estas la unua papaveto, kiun mi renkontas, li diris kun ravita rideto.

Kaj post gaja babilado, **Momo** proponis ŝin kisi. Ĝoje ŝi akceptis. Klinante sian ruĝan kapon super la Histriko por la kizado, ŝi subite eksentis intensan doloron ĉe siaj delikataj petaloj trapikataj de longaj pinglo-haroj. "Aj! Aj! Aj! " ŝi laŭte ekkris. "Krudulo! Foren! Mi neniam plu volas vin vidi! Vi ŝirvundis mian belan korolon. ", ĝem-riproĉis ŝi al la konsternita histriko.

Post tiela neatendita interveno, **Momo** iĝis tute konfuzita; kaj apenaŭ li povis ekagi kaj reenpaŝi. Turninte sin por rigardi la malaperantan histrikon, ŝi malplezure ekrimarkis sur lia dorso plurajn pecetojn da ruĝaj petaloj similaj al sangogutoj, kaj ŝi ekploris.

Kaŝita en arbustaro, la histriko rememoris siajn gefratojn kaj geamikojn. Ofte kvereloj okazis inter ili, kaŭze de ĉi tiuj stariĝantaj longaj pingloj. Kunludante, kunpiedirante aŭ kundormante, ili ofte vundis unu la alian, kaj en tiuj momentoj aŭdiĝis plendoj ĉi tiaj: "Aj! Atentu, min vi ekpikis!" aŭ "Aj! Malproksimiĝu de mi, danĝeremulo!". Tia interpikado kelkfoje jam okazis eĉ pro **Momo** (liaj pingloharoj estis ege belaj, sed ankaŭ ege akraj), sed de tiam li evitis la proksimecon de la histrikaro. Iun vundi li ne plu volis, kaj eble ankaŭ esti vundita li ne plu volis. Do tiamaniere li longtempe kondukis. Sed antaŭ nelonge, tiel malfeliĉa, **Momo** ekprenis la decidon elarbariĝi. Hodiaŭ, bedaŭrinde, li ĵus ŝirvundis karegan floron!

Post ĉi tia longa pripensado, li sentis pezan



laciĝon kaj fortan kapdoloron, kaj fine ekfalis en dormon.

La sekvanta tago estis ankaŭ bela.

Momo pensis, kiel feliĉa li estus, se li havus flor-amantinon. Kaj li ekdaŭrigis plu la serĉadon de tiu amatino en la ĉirkaŭaĵo, preterpasante nun ĉiujn papavetojn.

Surgrimpinte sur monteton, la histriko iom atendis tiel senmoviĝe por trovi sian planan spiradon. Kaj dum la paŭzeto li ekrimarkis tre belan orkoloran floreteton sunbaniĝantan.

- Kia bela floreto vi estas! Kiel vi nomiĝas?, demandis **Momo**, starante apud ŝi.
- Orbutona, La Ranunkolo!, ŝi fiere respondis. Kaj vi?
- **Momo**, La Histriko!, li respondis per ĝoja voĉo.

Sekvis vigla babilado inter ambaŭ. La histriko, tute forgesinte Skarlata-n, pli kaj pli proksimiĝis al Orbutona. Kaj en tiu momento de petola konversacio, la sen-atenta **Momo** rimarkis nek la agrablan venteton, nek la orpolvon elfluantan de petalaro el Orbutona ĝis sia

vizaĝo. Tiu ora poleno kaŭzis egan inflamon de liaj okuletoj kaj nazeto. Larmegoj kaj sinksekvaj ternoj forte skuis lin. Tiel plorante, kaj nazpurigante senĉese, **Momo**, lacega, ekforiris plejble rapide de la ora floreto.

Ŝokite, ŝi turnis sin por rigardi la ĵus malaperantan histrikon, kaj mire ekrimarkis, sur lia dorso, multajn malgrandegajn poleneretojn similajn al orpolvo, kaj ŝi ekridegis.

Momo trovis necese kaj urĝe pripensi plu pri siaj am-aferoj. Li serĉis tertruon aŭ arbon, kaj trovis nur herbejon. Kvankam jam antaŭe li divenis, ke amo inter floro kaj histriko ne povas facile okazi, hodiaŭ li denove sin demandis, ĉu la revo pri renkonto de taŭga floro estas ebla por li. "Floroj, kompare kun mi, estas tiel malsamaj, kaj tiom pli delikataj ol mi!".

Snufante ankoraŭ iom, **Momo** sentis siajn ruĝajn okuletojn fermiĝi, kaj li profunde endormiĝis.



Dum la nokto multnombraj nuboj alvenis, kaj nun, en la frua mateno, pluveto vekis **Momo**-n.

Laŭŝajne, la histrikon malvarmumo trafis, ĉar intermita tuso aŭdiĝis. "Estus preferinde esti inter miaj kunuloj!", li malĝoje pensis, kaj ankaŭ: "Ne estas facile vivi en nekonata medio, sed aliflanke, travivaĵojn, kiujn mi laste spertis, neniam antaŭe mi povus ilin sperti. Do kion mi faru? Ĉu mi. . . ". Sed refoje li estis trafita de subitaj tusoj, kaj ne povis la pripenson daŭrigi. Sekve, rektigante la kapon, li ekvidis belan roz-

kaj viol-koloran floron fikis-rigardantan lin, kaj tiam tuj reaperis gaja humoro en lia brusto.

- Kia bela floro vi estas! Kiel vi nomiĝas?, li tuj demandis.

- Mi nomiĝas Malva, la Malvo!, ŝi respondis senridete.

- Mi, **Momo**, La Histriko!, li diris.

- Kion vi faris ĉi tie? Vi kutime ne loĝas en la kamparo, ĉu ne?, ŝi demandis per iom malaproba voĉo.

- Nu, antaŭe mi loĝis en arbaro, sed. . .

- Vi volas koni aventur-plenan vivon, ĉu ne? Ŝi lin interrompis. Malfeliĉe, vi malsaniĝis, ĉu?

- Tio ne gravas, mi estas nur malsaneta! Tusetu. . .

- Ne ne, tutnokte vi laŭte tusadis, vi eĉ min ĝenis dum la dormo, do mi ja bone scias, kia estas via sanstato!

- Nu. . .!

- Trinku ĉi tiun infuzaĵon, kiun mi ĵus preparis por vi! (ŝi ordonis al li prezentante grandan folion plenan je flava akvo).

- Kio estas tio?, demandis **Momo** iomete maltrankvila.

- Ne malfidu miajn kapablojn! Flegistino mi estas, mi povas kuraci multajn malsanojn. Trinku! kaj ripozu!

Fine la tutan dekoktaĵon li konsentis trinki, kaj post siesteto, pli bonfartis. Poste **Momo** sin turnis al apuda Malvo:

- Mi multe dankas vin, vi estas bonkora kaj sindonema. Estas agrable esti kun vi. Kaj mi neniam vidis tiel belan floron, kiel vin. Via beleco ja superas ĉiujn aliajn. . .

- Hm! Hm!

- Pardonu min! Mi volas diri, ke vi tute plaĉas al mi. Sciu, ke de ĉiam mi amegas florojn. . . Bedaŭrinde. . . Kia malfeliĉo! Tiuj ĉi longaj pingloj, kiuj estas sur la dorso de ĉiu histriko malhelpas nin, kaj ankoraŭ pli min. . . Denove pardonu min, mi ne volas per miaj ĝemoj kaj problemoj vin enuigi!

- Tute ne! ŝi diris kap-skuante, mi povas paciencie aŭskulti iun paroli. **Momo**, la Histriko, vi ŝajnas bona estaĵo, kaj se parolado helpas vin,



tiam parolu plu senĝene. Ankaŭ interparolado estas kuracilo.

-Dankon, Malva! Kaj post momenteto, li diris: Mi ne povis daŭrigi solecan vivon, tial mi elarbariĝis. Ĉu vi povus iam ami min, Malva? li abrupte demandis al la floro.

Tiam ŝi klarigis al li, kial en ŝia viv-plano neniam ŝi deziris kunvivi kun iu ajn viro, ĉar ŝi volas dediĉi sian tutan ekzistadon al kuracado de aliuloj.

- Sciu, ke mi povas kuraci aŭ almenaŭ mildigi ĉiaspecajn malsanojn aŭ infektaĵojn de la haŭto, buŝo aŭ gorgo. Ekzemple, per infuzaĵo mi sukcesis kvietigi vian tusadon, ŝi diris ridetante.

La Histriko estis tre interesata, kaj demandis, ĉu ŝiaj konoj povus moligi malmolajn pinglo-harojn, ĉar li jam dispecetigis la petalaron de papaveto. Ŝi respondis, ke li devas nepre konservi la malmolecon de siaj pingloj, necesan por la sindefendado kontraŭ vulpo aŭ vaganta hundo. Ŝia respondo plezurigis **Momo**-n, kaj krome li volis scii, ĉu gravas ellaso de florarpolvo. Ŝi klarigis, ke poleno estas nepre necesa por fekundeco, kaj ke sen ĉi-lasto ne estus floraro, insektaro, kaj fruktaro. Li plu demandis al Malva, ĉu abunda polen-ellaso de ranunkolo povas mortigi la floron mem. Ŝi trankviligis la Histrikon, kaj kun rideto ĉe la buŝangulo ŝi siavice demandis, ĉu elsendon de poleno hieraŭ li ricevis. Hontete li kapjesis.

- **Momo**, ŝi diris, floroj ne estas tiom delikataj, kiom vi pensas. Mi kredas, ke vi, histrikoj, estas eĉ pli delikataj ol ni floroj, ĉu? Kaj pri via malvarmumo, mi pli ĝuste pensas, ke vi malsaniĝis pro alergio al poleno. Cetere ĉi-

matene mi jam suspektis tion, kaj donis al vi taŭgan infuzaĵon. Iun tagon se vi denove malsaniĝos pro alergio aŭ alia malsano, venu al mi, por ke mi helpu vin, kaj ŝi aldonis: kiel mi jam faris por multaj homoj.

-Homoj? ekdiris la Histriko, neniam mi vidis homojn! Ĉu ili aspektas kiel bestoj aŭ plantoj?

- Ili similas al stariĝantaj bestoj. Ĉu vi volas vidi ilin? Plejofte ili venas de ĉi tie. Ekiru en tiun ĉi direkton, kaj certe iun homon vi renkontos!

Kaj post varmaj dankoj kaj salutoj inter ambaŭ, la scivolema Histriko ankoraŭfoje ekforiris por malkovri aliajn kuriozaĵojn.

"Ho, helpon! Helpon!", mallaŭte diris **Momo** rondigante la dorson kaj klakante la dentaron.

Tuj antaŭ si, post ĉirkaŭ du horetoj da marŝado, li ekvidis homon kun du longaj kruroj vestitaj per kaŭĉukaj botoj, alvenantan rapide al lia direkto.

La homan aspekton al li Malva jam priskribis, sed vidi iun mem estis multe pli impresa. Timigite li plej rapide serĉis kaŝejon kaj li ĝin trovis enŝovante sin en interplektaĵon de duonsekaj kaj verdaj herbegoj. Inter la herboj **Momo** senbrue rigardis la timigantan homon alproksimiĝi, kaj uf! lin preterpasi. "Savita!" li pensis. Repreninte sian saketon da aveloj, li daŭrigis la marŝadon, kaj baldaŭ ekvidiĝis muro alta kaj ŝajne senfina. Konsiderante ĝin, **Momo** volegis scii, kiaj aferoj troviĝas ĉe la alia flanko. Kvankam arbogrimpi estas tre facila por histrikoj (dank'al ungegaj kruretoj), surgrimpi tiun muregon, ŝajnis al li ja neeble. Sed dum la irado laŭ la muro, la Histriko fine malkovris ie ĉe la malsupro breĉon, kiun li penege ekgratis per siaj antaŭaj piedoj, ĝis li sukcesis ĝin plilarĝigi. Fine, transirinte la tutan muron, **Momo** subite ektroviĝis kvazaŭ en paradiza ĝardeno.

Senpolvigante la bruston kaj kapon, li ĉirkaŭrigardis ĉiujn tiujn admirindaĵojn. Poste, li penetris pli profunden en la ĝardeno, kaj atente ekzamenis ĉiaspecajn belaĵojn, kiuj konsistis el floroj, fruktaroj kaj multaj nekonataj plantoj. Vidante belan ĵus-falintan



pomon, la juna histriko, ĉiam malsata, prenis la frukton, kaj ĝin manĝis. Sed dum la manĝado, dua pomo falis de la arbo, kaj bum! forte frapis la voston de la kompatinda pika besteto, kiu tuj iris retroen starigante siajn pinglo-harojn. Tiel preta kontraŭ ebla atako de ia ajn malamiko, **Momo** ekaŭdis tre proksiman inan voĉon krietmalantaŭ li: "Ho! Haltu! Ĉi tie mi estas!".

Jen, flanke de la ombreta aleo, staris ĝardeno plena de multkoloraj kaj bonodora. **Momo** streĉis la kapon por admiri iom pli proksime ĉi tiun novan renkonton, kaj flari plu la delikatan odoron eliĝantan el ŝi. Sed ĉi-foje la tempon li ne havis, malkiel ŝi, por demandi pri kutimaj unuaj demandoj.

- Kia bela besteto vi estas! Kiel vi nomiĝas?, ŝi tuj diris.

- **Momo**, la Histriko!, li respondis, iom surprizite. Kaj vi?

- Dia, la Dianto!

- Ho, kia belsona nomo! Kaj ankaŭ vi belas!, li diris jam ĉarmigita.

- Dankon! Mi neniam vidis vin ĉi tie, kie vi loĝas?

Instigite, **Momo** bonvole ektrakontis al ŝi sian vivon en la arbaro kaj tiun, pli freŝdate, en la kamparo. Ordinara vivmaniero kaj aventuroj de la Histriko ege kontentigis ŝin, ĉar per ĉi tiu riĉa rakontaro, multaj novaj bildoj estiĝis en ŝia menso. Floro ne povas iri, do rakontoj de aliaj estis necesaj, por ke ŝi plu revadu, kaj iom pli la mondon komprenu.

"Mi ne havas tiel rompiĝeman petalaron, kiel Skarlata, kaj mia poleno ne estas tiel elsendiĝema, kiel tiu de Orbutono.", ŝi klarigis pri si mem al **Momo**. Kaj post eta pripensado pri Malva, ŝi aldonis kun iom da memfido: "Vin mi volas igi mia am-kunulo!".

Ekridetante pro ŝia spontana sincereco, la Histriko, pri la Dia postulo, tute konsentis kun ŝi; nur tion li ja deziris.

Tio okazis iam, en la mezo de printempo.

Dum iu bela tago, ne longe post la sunleviĝo, tiu kiu iĝos la plej fama floro el la mondo, ĵus



naskiĝis. De jam kelka tempo la ĝardenisto plurfoje ĉiutage eniris en la ĝardenon kontroli la baldaŭan flor-naskiĝon. Kaj tiun matenon, kiam li alproksimiĝis al la loko, kaj vidis Dia kaj **Momo** kun la kapo kliniĝinta kontraŭ la arbetido, li tuj komprenis, ke la nova floro fine estis ja naskita.

Kaj **Momo** aŭd-diveninte la eniron de la ĝardenisto en la ĝardenon, amuze pensis, ke nun la du longaj kruroj vestitaj per kaŭĉukaj botoj ne plu timigis lin, kiel iam, kiam li por la unua fojo ekvidis homon. Rememorante tiun iaman momenton, kaj pro asocio de ideoj, subitaj larmoj aperis en liaj okuloj, kaj li pensis en sia koro: "Nun en la ĝardeno mi plene amas mian vivon!".

Post koraj salutoj al la gepatroj, la ĝardenisto genuiĝis ĉe tiu arbedo, kaj la nov-naskitan floron rigardis detale. Kun granda neforviŝebla rideto la ĝardenisto diris: "Tian floron mi neniam vidis!" kaj per tremetanta voĉo li deklaris:

"Vere, sen ia dubo, ĝi estas la plej bela floro el la mondo!", kaj post denova observado li daŭrigis: "Kian belegan floron vi ambaŭ kreis! Per ĝiaj rozkoloro kaj bonodoro ĝi sam-aspektas kiel la patrino, kaj per ĝiaj pingletoj ĝi similas ankaŭ al la patro!". Sekve li konklude diris ektuŝante la dornetojn de la florido: "Naski ĉi tian mirindan floron nur vi ambaŭ povis. Gratulojn kaj dankojn! Mi certas, ke ĉiuj en la mondo volos ĝin posedi en sia ĝardeno!". Kaj post pripensa momenteto li demandis: "Sed kiel nomi ĝin?"

- Tute simple, respondis Dia kaj **Momo** kune, *Roza, la Rozo!*

Jen estis tiel, ke, dank'al la amo inter la floro nomita "*Dia, la Dianto*" kaj la besteto nomita "*Momo, la Histriko*" okazis la naskiĝo de la unua *Rozo*, floro kiun amas nun ĉiuj en la mondo .

FINO

Elverkita, la 08-an de novembro 2015

Elina, kies filineto nomiĝas Rose [Roz] (Rozo), donis, pri ĉi tiu nomo, la jenan klarigon:

Ŝi mem estas denaska Esperantistino, kaj ŝiaj gepatroj donis al ŝi kiel duan nomon, tiun de Dianto. Sekve la patro de Rose ŝatas sin kompari kun histriko, -kies pingloharoj vere ĝenas la proksimecon inter ili -, ĉar li ofte preferas nur la ĉeeston de siaj familianoj al tiu de eksterfamilianoj. Do, ŝi konkludis, ke ne estas mirinde, se ilia filino Rose nomiĝas tiel.*


**Plulegu pri: La dilemo de la erinaco aŭ de la histriko de Arthur Schopenhauer*

Post legado de la rakonteto, provu trovi la dek respondojn en la teksto aŭ en la bildoj:

La tri unuaj trovintoj ricevos rekompenceton disdonotan dum la printempa staĝo de la Nancia klubo (tajpu kaj sendu la respondaron per ĉi tiu retadreso: cathello@laposte.net).

- 1) Kial Momo estas malkontenta pri aliaj histrikoj?
- 2) Kiel sentas sin Momo, post la decidiĝo elarbariĝi?
- 3) Kion enhavas la surŝultra saketo de Momo?
- 4) Rigardu la trian bildon: Kio estas la ruĝaĵoj sur la dorso de Momo?
- 5) Observu la kvaran bildon: Kial Momo havas naztukon en la manoj?

- 6) Vidu la kvinan bildon: Kial oni tuj komprenas, ke Momo trinkas kuracan trinkaĵon?
- 7) Kial Momo preskaŭ surtretis Dia, la Dianton?
- 8) Rigardu la lastan bildon: Al kiu apartenas la kaŭĉukaj botoj?
- 9) Kiom da malgrandaj bestoj entute vi sukcesis trovi sur la sep bildoj?
- 10) Sur kiu bildo verdaj steloj vidiĝas?

Espéranto France-Est		Orient-Franca Esperanto-Asocio.
La Informilo	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale ESPERANTO	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo ESPERANTO
Rédaction: Redaktoro:	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

Komitato de la Asocio		Comité de l'Association	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Secrétaire adjoint</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN	03.29.85.05.09 03.02.13.01.32	catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.89.45.62.89	andreo.ag08@free.fr por pezaj dokumentoj prefere al andreo.ag09@gmail.com
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	thibias.jean-luc@wanadoo.fr libroservo.efe@wanadoo.fr
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.95.55	michelinecolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	ginettepineda@numericable.fr
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr
	S-ro Bertrand WICK	03.89.69.86.42	bertrand.wick@orange.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net

Abono al La Informilo →	15 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← Abonnement à La Informilo
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	Esperanto France-Est		← Paiement par chèque au nom de
Pagoj per ĝiro al jena konto →	CCP 1997 72 W NANCY		← Paiement par virement au compte
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Staĝo Art sur Meurthe	15. Nova urbo Ĵamboreo	<p>ISSN 0291 6037 trimestriel N° CPPAP : 0409 G 83517 bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle Espéranto France-Est MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République 54000 NANCY Directeur de la publication : Edmond LUDWIG Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : 30 septembre 2013 Imprimé par <i>l'imprimerie Sprenger</i></p>
2. Rakonto Momo la Histriko	16. Nova urbo Ĵamboreo	
3. Rakonto Momo la Histriko	17. Nova urbo geedza krizo	
4. Rakonto Momo la Histriko	18. Nova urbo Aloo	
5. Rakonto Momo la Histriko	19. Enigmaj kaj humuraĵoj	
6. Rakonto Momo la Histriko	20. Abonoj kaj kotizoj	
7. Rakonto Momo la Histriko	21. Kotiz-tabelo	
8. Komitatanoj kaj menuo	22. SAT-kongreso en Nitra	
9. Angulo de la prezidanto	23. Staĝo en Pforzheim	
10. Staĝo-aliĝilo kaj programo	24. Staĝo en Pforzheim	
11. Staĝo-aliĝilo kaj programo	25. Semajno en Roses	
12. Sud-Azia Kongreso	26. Semajno en Roses	
13. Thionville	27. Semajno en Roses	
14. Libroservo	28. Nia fototeko el Nitra	

Karaj gesamideanoj,



La lastatempaj eventoj tragikaj nin ne emigas al optimismo. Mi do ĉi-angule pesimismu helpe de mia traduko de versoj de la nordgermana poeto, aŭtoro de infanrakontoj kaj desegnisto Boy LORNSSEN, kun kiu mi persone konatiĝis dum turneo lia tra alzacaj postelementaj lernejoj. Ni esperu, ke lia prognozo ne realiĝu!

E. L.

Dio ilin kreis (Boy LORNSSEN 1922-1995)

*Dio ilin kreis kaj ilin lasis agadi
donacis teron, donacis spiriton, do-
nacis tempon.*

*Kaj ili ĉizadis ŝtonajn hakilojn,
ponardojn kaj lancojn kaj sagojn
kaj kiel idolon elektis kverelon.*

*Uzis ili la ŝtonojn por burgoj
kaj feron por kiraso kaj glav'
partigis laŭ bon'kaj malbono
kaj petis ĉe Dio pri sav'
kaj puŝis unu l'alian de l'ĉeval'.*

*Ili fandis pafilojn, kanonojn
kaj vortojn kiel honor'kaj kuraĝ'
kaj iris ĉi-pere militi
kaj Dion petegis por venk'
kaj sterkis la teron per sang'.*

*Ili maŝinopafilojn konstruis
kaj teren la bombojn pluvigis
kaj parolis pri paco sur tero
kaj la pacon ne lasis estiĝi
kaj plu l'amastombon plenŝtopis.*

*Ili la lunon ekkaptis rakete
kaj rabis la verdon de l'ter'*

*mortigis la akvojn, la fiŝojn
kaj prenis de l'aer'ĝian freŝon
kaj kredis, ke venos pardon'.*

*Ili ludis per radiantaj sunoj
kaj la spirit'iĝis servist'kaj ekzekutist'.
La bonuloj kaj kredantoj plurevis
kaj l'ardan ekblovon ne vidis
kaj kredis je prava persist'*

*Ili konis nur sin, ne la tuton,
la tempon disipis kaj la feliĉon,
bruligis la vizaĝon de la tero,
la spiriton, l'estadon kaj l'estonton
kaj Dio la kreaĵon reprenis.*

De niaj gelegantoj

... Denove mi abonis por 2016 vian bul-
leton LA INFORMILO, la plej belan kaj enha-
voriĉan gazeton por longjara esperantistino kiel mi. Vi zorgeme
rakontas pri variaj okazintaĵoj, ilustras ilin per belaj fotobildoj ko-
loraj kaj eltrovas sciindaĵojn el la tuta mondo. Daŭrigu !
Kun sincera danko mi salutas vin kaj ĉiujn viajn kunlaborantojn.
Via Traudel Bengsch

Jen kuraĝigoj vortoj, kiuj direktiĝas
ne nur al la redaktanto, sed al ĉiuj
bonvolemaj kunlaborantoj. Mi kore
dankas ilin por daŭrigi la komenci-
tan laboron de nia amiko Pol.

Andreo


Deĵoradoj

**Samideaninoj de Nancy
deĵoras en Raon aux Bois
(Departemento Vogezoj).**



**Okaze de Bédéciné en
Illzach kaj de Ekologia
Foiro en Ungersheim
deĵoras membroj de
Mulhouse-Esperanto.**





ESPERANTO-NANCY-54 kaj
esperanto
France-Est
en amikaj rilatoj kun BAVELO
invitas vin al la :

79a Regiona Staĝo de Esperanto la 22/23/24ajn de aprilo 2016
en Centre de Loisirs d'Art-Sur-Meurthe
36 avenue de la Chartreuse, FR-54510 ART SUR MEURTHE
(N.48.66217° E.6.25104°)

Nia ĉi-jara regiona staĝo okazos en verda kaj trankvila distrocentro je dek kilometroj de Nancio. Meze de 11-hektara parko proksima de rivero Meurthe, ni disponos je unu el la 6 konstruaĵoj por laŭplaĉe lerni, babili, ridi, aŭskulti prelegojn, ĝui kantan spektaklon, rigardi farmbestojn ... aŭ trafoliumi la 700 titolojn de nia libroservo ! Ni ankaŭ povos manĝi kaj dormi surloke kaj turismi en la ĉirkaŭaĵo.

Venos specife al nia staĝo : Iŝtvan Ertl, kiu prelegos pri literaturo, Nataŝa Bertse el Svedio, kiu kantos dum la sabata spektaklo kaj Catherine Kremer, kiu faros prezenton pri la Unua Mondmilito.

Por atingi C.L.A.M. el la stacidomo de Nancy, uzu la buson de linio 13, kaj eliru ĉe la haltejo "Repentir"



Provizora Programo:

Vendrede 22-an de aprilo 2016

- 17a Akcepto de unuaj alvenantoj
- 19a Vespermanĝo
- 20a Interkona vespera, Ebleco viziti Nancion por la interesatoj

Sabate 23-an de aprilo 2016

- 8a00 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Vizito al la Muzeo pri la salo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de pliaj alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la Libroservo
- 15a Kursoj A, B, I + prelego de Iŝtvan Ertl
- 18a libroservo
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero: kantado de Nataŝa Bertse

Dimanĉe 24-an de aprilo 2016

- 8a ĝis 9a Matenmanĝo
- 9a /10a30 Kursoj A, I, Daŭrigo de prelego de Iŝtvan Ertl
- Prezento de Catherine Kremer pri la Unua Mondmilito, por la anoj de la paroliga kurso kaj aliaj interesatoj.
- 10a30/12a Daŭrigo de la tri kursoj kaj de la prelego de Iŝtvan Ertl
- 12a30 Tagmanĝo
- 14a Fino de la staĝo (eble kunveneto de la komitato de Espéranto France-Est.)

KURSOJ

- A: Komencantoj (débutants)**
Cours pour débutants par Catherine Hel.
- B: Paroliga kurso**
Gvidas Edmond Ludwig
- D: Seminario:**
Istvan Ertl pri literaturo
Catherine Kremer pri la Unua Mondmilito
- I: Infana kurseto (Ginette Martin)**
KURSOJ (kurslibro aĉetebla surloke eble estos necesa)

Por pliaj informoj :
esperanto-nancy-54@laposte.net
poŝtel. 00 33-(0)6.76.54.77.78

Daŭre aktualigitaj informoj:
http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr

La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero.



Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

Atentu: la nombro de disponeblaj litoj estas limigita: la unuaj respondintoj estos la unuaj servitaj. Se ne plu estos litoj en dulita ĉambro, eble povos esti proponita lito en plur-lita ĉambro, aŭ necesos trovi ĉambron en proksima hotelo .

ALIGĜOJ			
		1 lito por unu nokto en dulita ĉambro:	15 €
		Mantenmanĝo:	4 €
Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio	25 €	Tag- aŭ vespermanĝo sen trinkaĵo (eblas vegetarana manĝo)	10 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio	40 €	1 lito por unu nokto en dulita ĉambro + matenmanĝo	19 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	18 €	duon-pensio: 1 lito por unu nokto en 2-lita ĉambro + matenmanĝo + 1 manĝo sen trinkaĵo	26 €
Junulo inter 10 kaj 25 jaroj	12 €	kompleta pensio: 1 lito en 2-lita ĉambro + matenmanĝo + 2 manĝoj sen trinkaĵo	32 €
Infanoj malpli ol 10 jaroj	3 €		

Aliĝilo por la 79a Regiona Staĝo de Esperanto la 22/23/24ajn de aprilo 2016 en FR-54510 ART SUR MEURTHE

S-ro S ino	Familia nomo	Persona nomo	Malpli ol 25 aŭ studen- to	Aliĝ- kotizo	Elektita kurso
1		ĉef-aliĝanto			
2		kun-aliĝantoj			
3					
4					
Adreso					
Mi preferas vegetaran manĝon (signu) <input type="checkbox"/>					
Telefono:			Ret-adreso:		
Mi pagas (minimуме la aliĝkotizon) jenan sumon: € per ĉeko <input type="checkbox"/> per ĝiro <input type="checkbox"/> al Esperanto Nancy 54 CCP 4786-82 J NANCY Eksterlandanoj pagos surloke. Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.					
Mi deziras ricevi mapeton por helpi dum la alveno al la staĝo (signu) <input type="checkbox"/>					



Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :
Micheline Colnot
15 rue de Lavaux
54520 LAXOU
Ĉekoj nome de:
Esperanto Nancy 54
CCP 4786-82 J NANCY

Pliaj informoj ĉe
esperanto-nancy-54@laposte.net
poŝ-tel. 00.33.(0)6.76.54.77.78

La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Nancio
Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Nataŝa Bertse.

Nombro da manĝoj kaj da tranoktadoj en C.L.A.M.	Vendrede 22	Sabate 23	Dimanĉe 24
Matenmanĝo			
Tagmanĝo			
Vespermanĝo			
1 lito en dulita ĉambro			

La 3-a Sud-Azia Seminario en Katunayake - Srilanko 31.10.- 4.11. 2015

Srilanko - verda insulo banata de la Hinda oceano troviĝas proksime al la suda parto de Barato. Subtropika vetero favoras kreskadon de vegetaĵoj kaj divers-specaj palmoj. Ĉarmas belaj plaĝoj kaj fortaj ondoj, kiujn ĝisstate ĝuis Nepalanoj.

Nepalaj esperantistoj de NEspA sub la gvido de Bharat Ghimire la ĉeforganizanto en kunlaboro kun unusola esperantisto en Srilanko s-ro Zeiter Perera kaj kun helpo de Pradip Ghimire kaj Hori Jasuo sukcese organizis la 3-an SAS en proksimeco de la urbo Kolombo. KAEM subtenis la aranĝon finance. La seminario temo estis: "Interkultura kompreniĝo".

Komencaj necertecoj pri la sukceso estis rapide anstataŭataj per entuziasmo kaj ĝojo ĉe alveno al Srilanko. La eventon partoprenis dudek-unu esperantistoj el Nepalo, kvin el Barato, unu el Pakistano, unu el Japanio, unu el Srilanko kaj du el Francio, kiuj estis la solaj esperantistoj el Eŭropo.

La programo komenciĝis sabate posttagmeze la 31-an de oktobro 2015 per registrado de la partoprenantoj. Ekfunkciis ankaŭ malgranda libroservo. Poste okazis unua komitata kunsido kaj samtempe Hori Jasuo instruis la E-himnon, montris kaj sonigis diversajn muzikilojn. Dum la interkona vespero prezentiĝis ĉiuj partoprenantoj kaj vigle interbabilis pri diversaj temoj kaj pri siaj ŝatataj hobiaj.

Dimanĉe okazis la malfermo de la seminario. Bonvenigis nin s-roj Bharat Ghimire kaj Zeiter Perera. Honora gastoj Hori Jasuo en ĉeesto de aliaj komitatoj lumigis tri kandelojn simbolo al la 3-a SAS. Poste estis legataj salutmesaĝoj de UEA, KAEM, ILEI. Sekvis salutoj de reprezentantoj el diversaj landoj. Liba salutis nome de ĉiuj ĉefaj esperantistoj kaj Floreal nome de la francaj. Por komencantoj kaj progresintoj okazis E-kurso. Hori Jasuo parolis pri Esperanto-Sumoo. Post la tagmanĝo, en la prelego de Cholnath Pokhrel, ni ekkonis la nepalan kulturon. Divers-regionaj popoldancoj estis montritaj sur televid-ekrano. Pri la Esperantomovado en Barato raportis sinjoroj Reddy, Siva kaj Giri. Vespere ni spektis buntan dancprogramon de nepalaj samideanoj. Belege vestitaj virinoj en naciaj kostumoj prezentis serion da dancoj kaj kantis nepale. Ili informis pri baldaŭa festo de la Lumo - Divali kaj estis lumigitaj pluraj kandeloj. Tre bela kaj gaja etoso daŭris ĝis la noktomezo.

La belecon de la verda insulo ni admiris sekvan tagon dum la tuttaga ekskurso. Survoje al la urbo Kandy, kiu troviĝas 116 km for de Kolombo ni unue haltis en herbo-ĝardeno, kie oni klarigis al ni la utilecon de diversaj unuopaj herboplantoj. Eblis aĉeti produktojn kontraŭ diversaj




doloroj kaj malsanoj. En la urbo Kandy ni vizitis la templon Dala da Maligawa, (Templo de la Dento). Pro malboniĝinta pluvega vetero ni ne povis viziti la faman botanikan ĝardenon Peradeniya. Survoje al la urbo Nuwara Eliya (urbo de la Lumo) troviĝas pluraj akvofaloj. La urbo situas en alteco de 1900 metroj meze de teoplantejoj. En Ramboda ni haltis kaj vizitis la teofabrikon "Blue Field" kun klarigoj pri diversaj teoj (nigra, verda, blanka) kaj vidis la procedon de iliaj fabrikadoj. En Srilanko oni ĝis nun rikoltas la teo-foliojn permane. Laŭdire srilankaj teoj estas la plej bonaj en la mondo.

Marde okazis denove Esperanto-kursoj kaj la dua komitata kunsido en kiu oni decidis starigi fonduson por Sud-Azio. S-ro Saeed el Pakistano prelegis pri islamismo kaj sufismo. Diskuton pri la seminario gvidis s-ro Giri el Barato. Ni ankaŭ eksciis pri srilanka kaj nepala movadoj kaj ricevis informojn rilate al Esperanto pri aliaj sudaziaj landoj. Kun Bharat la partoprenantoj lernis kelkajn E-kantojn. Posttagmeze Hori Jasuo prezentis kaligrafion kaj ni skribis la vorton amikeco en diversaj lingvoj. Geedzoj Liba kaj Floreal Gabalda prezentis filmon pri la lastjara Unua Speciala Renkontiĝo en Nepalo. Vespere ni okazigis bankedon kaj bingo-ludon lerte prezentitan de nia japana samideano Hori Jasuo. Li ankaŭ provizis valorajn premiojn por ĉiuj. Je la fino ni aŭskultis kelkajn kantojn kaj dancis en akompano de tamburo ludata de Bharat ĝis malfruj horoj.

La 4-an de novembro matene okazis fermo. Oni resumis la disvolviĝon de la seminario kaj konstatis, ke ĝi bone sukcesis malgraŭ komencaj duboj kaj malfacilaĵoj pri la organizado. Bedaŭrinde pro manko de loka kontakto ne povis okazi la planita lingva festivalo kaj prelegoj en publikaj lokoj. Ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj, bone amuziĝis kaj pasigis agrablajn tagojn en Srilanko. Posttagmeze ni revizitis la urbon Kolombo kaj vespere ni jam forflugis al Barato, kie postsekvis la trajn-aventuroj. Koran dankon al la organizantoj de la 3-a SAS, kiuj multe ŝvitis por bona sukceso de la seminario. La venonta SAS estos planita en Barato.

Liba Gabalda





Activités “Espéranto-Thionville”

Voyage à Istanbul et en Iran

Conférence diaporama au café culturel Le Gueulard à Nilvange le 18 septembre 2015.

Durant deux mois en juillet et août 2012, Bruno HENRY son sac sur le dos voyage par le train à travers l'Europe centrale et les Balkans pour visiter Istanbul et l'Iran. Il est accueilli chez des amis espérantistes et des membres du *Pasporta Servo* qui lui font découvrir leur culture et des lieux magnifiques chargés d'histoires. Il raconte son périple en images puis réponds aux questions

des auditeurs espérantophones et non espérantophones

Le récit de ce voyage est paru dans La Informilo N°169, 170 et 171.

L'association Espéranto-Thionville a organisé cette conférence avec le concours de l'Association Nilvangeoise Forum des Citoyens et le Café culturel Le Gueulard. Elle été annoncée dans le Républicain Lorrain.

Cours d'Espéranto:

Les cours pour débutants redémarrent le 7 janvier 2015 puis auront lieu chaque jeudi de 18H00 à 20H00 sauf vacances scolaires à la maison de quartier Jacques Prévert, 10 boulevard des Près de Saint-Pierre à Thionville. Contact animateur Antonio QUIJADA <ankio0945@gmail.com>



Réunions de conversation:

Elles ont lieu un jeudi par mois de 14h30 à 15h30 au “Gueulard Plus” rue Victor Hugo à côté de la mairie de Nilvange. Prochaines dates: 14/01/2016, 11/02/2016, 10/03/2016, 14/04/2016, 12/05/2016 et 09/06/2016.

Contact Antonio QUIJADA <ankio0945@gmail.com>

Informations Bruno HENRY <esperanto.bhenry@yahoo.fr>





El nia libroservo



Informoj

La libroservo kompreneble partoprenos la venontan komunan staĝon en Art Sur Meurthe, apud Nancio, la 22/24ajn de aprilo...kaj ĉiuj ĝiaj libroj estos tie haveblaj !

Atendante tiun gravan eventon, eblas malkovri ĉi tiujn nove alvenitajn librojn :

Ĝis baldaŭ !

Jean-Luc Thibias



Novaj libroj :

①



②



③



④



⑤



⑥



1) Krimo estas nia, Diversaĵo, **kalle Kniivilä**, *Mondial* (2015) 156 paĝoj. **15 €**. Rikolto de opinioj de loĝantoj en Krimo, ĵus aneksita de Rusio (vidu la recenzon de Edmond Ludwig en Informilo 171, p. 15).

2) Cent jaroj da soleco, romano, **Gabriel Garcia Márquez**, *Mondial* (2015), 414 paĝoj. . Prezo: **26,10 €**. Reeldono de traduko de ĉefverko de nobelpremiita kolombia aŭtoro. Historio de familio dum 7 generacioj.

3) Lerta piedulo, romano, **Eliane Dissard**, *Abbée Editions* (2015), 56 p, **12 €**. Dulingva (franca-Eo) romaneto pri mistero solvota de juna detektivo kaj liaj amikoj. Bona legolibro por komencantoj.

4) Libazar'kaj Tero, romano, **Julia Sigmond – Sen Rodin**, *Mondial* (2013), 456 p, **29,40 €**. Fantazia romano pri vivo de loĝantoj de planedo ĝemela al Tero. . .

5) Marina, romano, **Sten Johansson**, *Mondial* (2013), 192 p, **15,30 €**. "Marina kaj Tomas: du Svedoj kun malsamaj originoj, kun sortoj malsamaj, kies padoj jen krucas sin jen malkuniĝas. Neatenditaj eventoj kaj revelacioj formas ilian rilatojn. . . ĝis Marina malaperas. . .".

6) Skabio, romano, **Sten Johansson**, *Mondial* (2015), 180 p, **17,40 €**. "Stefan vekigiĝas en prizono. De tempo al tempo, du policianoj pridemandas lin pri krimo kaj aliaj okazintaĵoj, pri kiu li ŝajne nenion scias. "

Por mendi librojn :

- Vi sendas vian mendon
 - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-dorsan mendilon)
 - per e-poŝto al "libroservo.efe@wanadoo.fr"
 - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
- Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkosto)
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"
IBAN : FR 98 20041 01010 0280076H031 97
BIC : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

Mendilo

Bonvolu sendi tiujn librojn al jena adreso:

S-ro/S-ino

En

la

Subskribo:



UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

Meze de la pasinta somero, samtempe kun la jubilea Universala Kongreso de Esperanto, okazis la 23a Monda Ĵamboreo de Skoltoj al kiu aliĝis 33,000 geknaboj el ĉ. 150 landoj.

Ĵamboreo

Por la ĉijara ĵamboreo oni disponigis duoninsulon kun artefarita plaĝo Kirarahama, situita ĉe Yamaguchi Golfo (parto de la interna Seto-maro). Tiel la skoltaro povis ĉiutage praktiki akvo-sportojn: naĝi, subakviĝi kun spirtuboj, velboati, bretveladi, flosi, fiŝkapti k.t.p. La programo por tiu granda evento estis detale prilaborita kaj inkludis tiajn temojn kiel: kulturo kaj scienco, protektado de la naturo kaj de nesalaj akvoj, kredo kaj religioj, volontula soci-laboro por komunumoj.

Ĝenerale, on fokusis je kelkaj pli gravaj projektoj. Unu estis nomita "Disvolviĝa Globa Vilaĝo" kiu celis atentigi pri la neceso konstrui pacon, protekti sanon kaj homrajtojn. Oni substrekiis kiel gravas scipovo evitigi natur- kaj soci-katastrofojn. Se tamen tiaj okazos, necesas anticipe sin prepari por ilin kontroli kaj mildigi la efikojn.



La 6an de aŭgusto okazis tuttaga ekskurso al Hiroŝimo, kie precize antaŭ 70 jaroj eksplodis atombombo. Sur la supra ĵamborea aŝiso videblas parto de la monumento dediĉita al Sadako Sasaki – knabino kiu tenas la gruon. Ŝi mortis 12-jara pro la post-eksploda radiado kaj antaŭe volis faldi mil paperajn gruojn sed faris nur 644. La klas-amikoj finis la ceterajn kaj entombigis ilin apud Sadako.



La dua ĉefprojekto - "Kulturaj voj-kruciĝoj" (CRC, *Crossroads of Cultures*) temis pri respekto al alinaciaj kulturoj kaj interŝanĝo kun iliaj valoroj. Ĉi tie valoras menciigi la tre interesan kaj eble sekvindan ideon. Dum la ĵamboreo funkciis reto de 200 junaj korespondantoj (ĵurnalistoj) el diversaj partoj de la mondo. Ili sendadis ĉiutage raportojn kaj artikolojn al siaj regionaj gazetoj.

Ni ĝojas informi, ke dum la ĉijara ĵamboreo **Skolta Esperanto-Ligo** havis sian standon. Sur la SEL-tablo estis dismetitaj diversaj libroj kaj broŝuroj. Miloj ĝin ekvidis, multaj venis kun demandoj kaj la deĵorantoj respondis.

Historion de la skolta movado formis unue Roberet Baden-Powell, komence de la 20a jarcento. Jam en la unuaj skoltaj tendaroj partoprenis Aleksandro William Thompson ("Avoto") kiu volis faciligi internaciajn kontaktojn inter la skoltaro kaj en jaro 1918 fondis Skoltan Esperanto-Ligon. Ekde tiam, esperantistaj gejunuloj partoprenis en preskaŭ ĉiuj grandaj eventoj de la monda skolt-movado. Al popularigo de Esperanto kontribuis grave hungaraj skoltoj, kiuj en 1931 organizis la unuan SEL-tendaron. La iniciaton tuj apogis Belga Skolta Ligo, Slovaka Katolika Skolt-Asocio kaj skolta "Klubo de s-ta Patriko" el Irlando. Aperis E-lecionoj en la gazetoj kaj fondiĝis Skoltina Esperanto-Sekcio. Granda sukceso okazis dum la 4a Monda Ĵamboreo en Gödöllő (norda Hungario, 1933) ĉar partoprenis ĝin ĉirkaŭ ducent SEL-membroj el 24 landoj. En radio aŭdiĝis esperantlingvaj salutoj kaj kantoj.

Tiam aperis la propono adopti Esperanton kiel trian oficialan lingvon de Ĵamboreo, sed la pozitivan decidon malebligis Monda Skolta Oficejo. Tio ne malkuraĝigis la esperantistajn aktivulojn kaj sekvajare slovakoj organizis la sekvan SEL-tendaron. En pitoreska regiono de Banská Bystrica, tiun tendaron partoprenis geskoltoj el 9 landoj.

Nun mi prezentu la meritegan figuron de la postmilita E-skoltismo. Jacobus Klaas Hammer (1928-2011), konata kiel "**Ko Hammer**" estis nederlanda esperantisto kiu dum jardekoj aktivis en SEL, ankaŭ kiel ĝia ĝenerala sekretario. Mi havis la plezuron persone renkonti Ko Hammer. En la 1970aj jaroj mi veturis tra Nederlando kaj haltis por unu tago en urbo Zaanstad, kie li loĝis kun sia edzino Tiny. Ili akceptis min gastame kaj en lia domo mi ekvidis tre interesan tradicion. Por la vespermanĝo, s-ino Tiny dismetis surtable specialan blankan tablotukon. Tie iliaj E-gastoj skribis sian aŭtografon, kiun poste ŝi brodis. Do mi povis vidi surskribojn de multaj gastoj, inter ili de kelkaj tre konataj esperantistoj. Tiu kutimo ege plaĉis al mi. Poste s-ro Hammer petis sian edzinon ke ŝi prezentu kelkajn kantojn, do ni povis aŭskulti ŝian belan voĉon. Ĉarma etoso de tiu vespero firme kuŝas en mia koro.



J.K. Hammer

Antaŭ la forveturo, li donacis al mi serion de E-pinglosignoj kiujn mi posedas ĝis hodiaŭ, kiel belan suveniron de mia vojaĝo. Poste ni organizadis ĉiujare **ISET** (Internaciajn Skoltajn E-Tendarojn) en Aŭgustova Lagaro, norde de Bjalistoko. Partoprenis ilin gejunuloj el Hungario, Bulgario, Jugoslavio, Germana Demokratia Respubliko, Finnlando, Hispanio kaj nature el Pollando. Dum la junula kongreso en Veliko Tarnovo ni parolis kun la tiama TEJO-prezidanto, Savas Tsiturides. Li helpis nin kontakti E-verkistinon Despina Patrinu, kiu alvenis al ISET kaj prezentis siajn librojn. Proksime tendumis skoltoj el Aŭstrio kaj ili memvole aliĝis al niaj E-kursoj. Sur alia bordo de nia lago sian tendaron havis junularo el Sovetunio kaj ni ĉiuj pasigis kune du belajn vesperojn. Se Ko Hammer venus al niaj tendaroj, li certe estus feliĉa sed bedaŭrinde – ni neniam plu renkontiĝis. Tiom da personaj rememoroj.

Skolta Esperanto-Ligo daŭre aktivas kaj kvarfoje en la jaro aperas "La Skolta Mondo" - ĝia periodaĵo. Pri lasta agado de SEL ni publikigos ion estonte, precipe ke proksimiĝas ĝia 100-jara jubileo. Dume ni citas titolojn de la tri bonaj libroj, kiujn Ko Hammer verkis pri skoltado:

- *Ĵamborea lingvo* – pri la historio de la Mondaj Ĵamboreoj
- *Skolta kaj tenduma terminaro* – https://eo.wikibooks.org/wiki/Skolta_kaj_Tenduma_Terminaro
- *Vastaj horizontoj* – broĉuro bele ilustrita kiun oni poste tradukis en 11 lingvojn (angla, araba, franca, germana, hispana, japana, kataluna, nederlanda, portugala, norvega kaj sveda).

Pri tiuj libroj vi trovos informojn Xe: http://www.geocities.ws/skolta_esperanto_ligo/eo/eldonoj.htm

Kiel ni menciis, la skoltan movadon fondis Robert Baden-Powell. Reveninte el Sudafriko, li rimarkis ke anglaj infanoj aspektas malfortaj, ĉar ne aktivas fizike. Tial ili ne atingas plenan sanon, nek estonte povos utiligi bone siajn talentojn por la socio. Komence de la 20a jarcento li pripensis la projekton kiu helpus gejunulojn disvolvi ilian fizikan, mensan kaj spiritan eblecojn: hardi la korpon en senpera kontakto kun la naturo, per subĉielaj ludoj en freŝa aero kaj per praktikado de traviv-kapableco en malfacilaj /primitivaj cirkonstancoj. Tiucele "**B-P**" (tiel li estas nomata en la skolta movado) verkis libron *Skoltismo por knaboj* (Scouting for boys) kiu estis publikigita en 1908, iĝis tre populara kaj tradukita al multaj lingvoj.



Monda Organizaĵo de Skoltaj Movadoj nombras pli ol 30 milionojn da membroj en 165 landoj. Tial ĝi estas verŝajne la plej granda junulara movado en la mondo. Kvankam Baden-Powell jam ĉe la komenco esprimis favoran opinion pri la Internacia Lingvo, nuntempe Esperanto ne estas tie agnoskita inter la oficialaj laborlingvoj. Tamen nenio malhelpas ke plue okazu skoltaj E-tendaroj kaj oni permesas reklami nian lingvon, kiel ekzemple dum la ĉijara Ĵamboreo.

Venas la konkludo, iom ŝerca. La oficiala blazono de skoltismo konsistas el orkolora lilia floro (simbolo de skoltoj) kaj fone – el verda trifolio (por skoltinoj). Jen kiel sorto venĝas je obstinuloj: vole-nevole, sur ambaŭ flankoj oni metis ne unu, sed la du verdajn (E-)stelojn, eble unu por skoltoj kaj la dua por skoltinoj.

Nova Urbo (New City / Città Nuova) estas internacia soci-kultura magazino eldonata de Fokolara Movado en kelkdeko da lingvoj. Ĝi antaŭenigas ideojn kaj konkretajn projektojn serve al reciproka kompreno kaj unueco en familiojkaj komunumoj, kaj krome – je pli vasta skalo – inter homoj de diversaj nacioj, kredoj kaj sistemoj. Fondinto de tiu movado, Chiara Lubich ricevis UNESKO-premion por Paca Edukado en decembro 1996.

Manko de komunikado kaj nekapablo trovi pozitivajn trajtojn de la alia estas ofta kaŭzo de la krizoj en la tro individualista socio. Tia socio, formita de amaskomunikiloj, ŝajnas ne plu kredi je geedza devontiĝo por longdaŭraj interrilatoj. Por ke la geedziĝinta paro vivu trankvile kaj mem solvu diversajn problemojn, ili regule pasigu tempon kune. Tiucele ankaŭ gravas teni ĝustan distancon de la du famili-branĉoj (tiun de edzo kaj de edzino).

Ĉu geedzaj krizoj ne inverseblas?

Dum la pasinta somero, en internacia urbeto Loppiano (itala provinco de Toskanio), okazis kurso pri konstruado kaj firmigo de unueco inter la geedzoj. La kurson organizis jam sepafoje la fokolara branĉo de Novaj Familioj. Tio estis bona, al multaj la unua, okazo por demonstri tutkoran pretecon servi al sia edzo /edzino. Interdivido de la spertoj kun tiuj geedzoj, kiuj sukcesis solvi siajn problemojn kaj travivi diversajn krizojn, montriĝis tre utila.


Pli junaj geedziĝintoj konvinkigis ke eblas kune transiri "senelirajn" situaciojn. Tio firmigas la interrilatojn kaj kuraĝigas ĉiam restari, pardonu unu la alian kaj denove kunlabori. Unu edzino diris: "kiam ajn okazas inter ni miskomprenoj aŭ disputoj – super ĉio brilas unu ĉefa ideo: nia geedza unueco devas esti savita". Dum interĝanĝo de la spertoj, unu geedza paro prezentis kortuŝan ateston el sia vivo, ke senkondiĉa pardonemo helpis ilin rekonstrui la unuecon, post 9-jara disiĝo... Konsiderante ĉi tiujn faktorojn, montriĝas ke eĉ la plej grandajn malfacilaĵojn povas esti venkitaj.

Tamen pado al la "renkonto" ne estas simpla. Alveninte, la geedzoj kunportas la profundajn suferojn kiuj streĉigas la atmosferon kaj igas esprimi nur malgajajn vortojn – rakontas Marina kaj Johano Vegliach, gvidantoj de la kurso. Malgraŭ tio oni provas trovi sencon de la familia vivo. Kelkaj, post longa tempo, sentas fremdecon al sia edzo/edzino kaj dubas pri celo de la futura kunvivado. Aliaj ne kapablas pardonu kaj aludas pri malebleco interkompreniĝi. (Eble ĉi tie ni povas citi la mondfaman verkiston kaj amikon de Esperanto, Leo Tolstoj kiu skribis, ke ĉiuj feliĉaj geedzoj estas similaj sed en malfelico – kontraŭe, la homoj tre diferencigatas).



Por la kursanoj serĉantaj silenton, estis malfermita kapelo en kiu ili povis preĝi, mediti kaj trovi la internan pacon. Tiuj trankvilaj minutoj ofte montriĝis la bona komenco por malfermiĝi kaj paciencie aŭskulti la aliajn. Laŭ progreso de la programo, oni eniris pli profunde en la problemaron de familia komunikado. En la praktika parto nomita "Lumo por geedzoj" la partoprenantoj volonte parolis pri siaj personaj travivaĵoj kaj spertoj. Tiu metiejo estis komparita kun konvenaj atingiĝoj de psikologio, praktikaj ekzercoj, interparoloj kaj sociaj ludoj. La mensoj repaciĝis, transformante ankaŭ la korojn. Ne estas sekreto, ke al sukceso de tiu kurso kontribuis ankaŭ aktiveco de la partoprenantoj. Antaŭ la forveturo, ĉiuj rimarkis ke la vizaĝoj ne plu estas malgajaj kaj en multaj okuloj ekbrilis eĉ radioj de espero. Kiam ni alvenis, ni sentis malplenen kaj en la kapo ĉirkaŭis nur unu vorto: "FINO" sed hodiaŭ ni revenas hejmen kun aliaj vortoj: "ni komencu denove" – diris unu geedza paro. Inter la kursgvidantoj troviĝis du geedziĝintaj paroj kiuj antaŭe jam partoprenis la kurson kaj poste decidis alveni por servi kompetente la aliajn. Ili jam sukcese trairis tunelon de mallumo kaj per sia vivo montris la eliron al aliaj.

Tial, la spertoriĉaj geedzoj povos plej bone apogi tiujn, kiuj troviĝas en la tunelo. Kompari sian propran situacion kun tiuj travivintaj pli komplikajn malfacilaĵojn aŭ dramojn donas la ĝustan perspektivon. Tia objektiva rigardo kuraĝigas plibonigi interpersonajn rilatojn en la familio kaj helpas liberiĝi de soleco, kiu ofte faras la krizon ne inversebla.



Laŭ konata metaforo, por kompreni alian homon oni devas "promeni en liaj ŝuoj" kio faciligas eniri mondon de la alia, kunsenti kaj atente zorgi pri sia edzino aŭ edzo. Per sincera dialogo oni povas sin reciproke riĝigi kaj, forlasinte malnovajn erarojn, pozitive rigardi la komunan estontecon. Unu diris: *Nun ni havas la rimedojn por eliri mem el nia fermita konko kaj certe ni uzos ilin en ĝusta momento.* La rezultoj de la kurso estos pritaksitaj fine de la ĉijara septembro en ĉ. 50-persona grupo de la kursgvidantoj, psikologoj, sociologoj, famili-terapiistoj kaj aliaj aliaj specialistoj.

Oni konsideras daŭrigi similajn kursojn ankaŭ en aliaj regionoj kaj landoj.

PS:

El nia propra sperto, ni povas diri ke dum diversaj miskomprenoj ne valoras tro multe paroli kaj indiki erarojn, kiujn faris la alia en pasinteco. Nia konato diris ke kiam la du geedzoj nervoziĝas, tiam – por anticipi malutilan kverelon – li foriras sole al unuhora promeno. Cetere, ĉiam valoras fari mallongan ekskurson laŭ river-bordo, apud lago, en parko aŭ arbaro. Beleco de la naturo kutime agordas nin serene. Tio faciligas rememori la feliĉajn momentojn de la geedza vivo: unua renkonto, reciproka fascino, enamiĝo, edziĝfesto, naskiĝo de la infanoj, familiaj festoj k.t.p. Rigardante laŭ tia perspektivo, verŝajne ni ekvidos ke la kurantaj miskomprenoj ne tiom gravas. Sekve, ni ne plu pensos negative, sed kapablas pardoni kaj pardonpeti. Kaj montriĝos, ke la alia "duono" ne tiom malbonas kiel ni suspektis antaŭe.

Utilaj plantoj:



Aloo

Aloo (sciencia /botanika nomo: *Aloe*, L) estas kaktosimila planto el familio asfodelacoj (*Asphodelaceae*). Originale ĝi kreskis en Afriko kaj apartenas al ĉ. 400 sukulentaj plantoj, kiuj en dezertaj regionoj kapablas rezervi akvon.



Tiu rigida, iom raspa planto havas dikajn foliojn kiuj kapablas absorbi akvon. La malgrandaj floroj povas esti flavaj, ruĝaj aŭ oranĝkoloraj kaj estas polenadaj de birdoj. Pro tio aloo estas foje kultivata en ĝardenoj kiel ornamplanto. Sed ĝi plej famas ĉar efike rapidigas kuracadon de diversaj vundoj. (Oni tamen estu singardema kaj ne apliku aloan sukcon al infanetoj, ĉar sur ilia delikata haŭto povas aperi brulvundoj).


Tiu ĉi planto estas riĉa je alkaloidoj, kiuj helpas neŭtraliĝi acidojn en homa korpo. Aloo fortigas la imunan sistemon, seninfektigas kontraŭ bakterioj kaj fungoj. Konata estas **aloo oleo**, la hel-flava kaj senodora fluaĵo kiu reguligas humidecon de haŭto, aktivigas sangocirkuladon kaj restarigon de novaj ĉeloj. En la nuntempa medicino, oni uzas la amaran ĝelecan sukcon de aloaj folioj por produktado de diversaj medikamentoj kaj kosmetikaĵoj kiel ekz. tiuj montritaj ĉi sube.



Kelke da interesaj informetoj pri tiu ĉi planto:

- Vi povas facile kreskigi aloon hejme en florpoto kaj se iu vundiĝos – tiam tranĉu peceton de la aloa folio, malfermu ĝin kaj apliku kiel pansaĵon.
- En Azio oni aldonas la planton por teo kaj en multaj refreŝigaj trinkaĵoj.
- Foje oni uzas aloan sukcon kiel laksigilon, kio tamen estas riska kaj en multaj landoj ne rekomendata.
- Por kosmetikaj celoj, oni uzas aloan specion *Aloes vera* (aŭ *Aloes vulgaris*) nomita en Esperanto "vera aloo" (kvankam pli konvena nomo estus verŝajne: *ordinara aloo*).

Ni lernu per distraĵoj



Humuraĵoj

KION NI BEZONAS POR FARI KUKON?

Jozefino faras kukon por la vespermanĝo.

Subite, ŝi vokas la edzon: Ho, Kruko! Mi ne havas sufiĉe da sukero por fari la kukon!

Kruko: Ne diru pli! Mi tuj kuros al la bazaro.

En la superbazaro, Kruko prenas pakaĵon da sukero.

Li telefonas: Jonjo, mi havas la sukeron. Dum mi estas en la bazaro, ĉu vi eventuale volas ion alian?

Jozefino: Nu, prenu ankaŭ iom da faruno.

Kruko: Farunon, en ordo. Ĉu alion?

Jozefino: Ovojn.

Kruko: Ovojn, en ordo. Ĉu alio?

Jozefino: Lakton.

Kruko: Ĉu ankaŭ lakton?

Jozefino: Kaj buteron.

Kruko: Bone, buteron.

Jozefino: Kaj se vi volas ĉokoladan kukon, aĉetu kakaopulvoron.

Kruko: En ordo -- sukeron, farunon, ovojn, lakton, buteron, kaj kakaopulvoron. Ĉu ion alian?

Jozefino: Jes -- aĉetu kukon.

KIAL

Du tremantaj tre maljunaj viroj sidas sur benko kaj diskutas:

- Ĉu vi memoras, kiam ni estis junaj, . . . kiam ni postsekvis la belajn junulinojn. . . ?
- Ho jes, mi memoras. . . sed. . . mi ne plu memoras kial. . .

HORIZONTALE

1. Person', kiu iras kun iu.
2. Grizeta metal'. Avenu'.
3. Aktor'.
4. Prepozicio. Ekzakta.
5. Bileto sen vokaloj. Konjunkcio.
6. Cedi. Regi.
7. Malriĉa loĝejet'.
INVERSE : reĝa moŝt'.
8. Sufikso. Tabelvor-to.
9. Mezurunu' por apacaj angloj.
10. Somazia urb'.

VERTIKALE

1. Aktiva opozici'.
2. Rondoturn' de fluido. Animalo. Stulta kaj kruda homo.
3. Vicmontra numeralo. Granda, aparta animal'.
4. Bronzepoka ŝtoneg'. KOLORA sen kolo.
5. Kunig' de multaj fadenoj. INV : ŝtatan' de norda lando.
6. Numeralo. Adverbo. Supernatura estaĵ'.
7. INV : ŝtatan' de okcidenta azia lando. Lardtort'
8. Diferenca. Vicmontra numeralo.
9. Membro de herezia doktrino.
10. Diktatura politika reĝim'

UNUOPE

En apoteko, dikega virino provas pesi sin. Ŝi metas moneron en la pesilon kaj atendas.

Venas la tikedo, ŝi legas ĝin kaj ploras.

Estis skribite: "Bonvolu uzi tiun pesilon unuope, tiu aparato estas malpermesita por du personoj"

LIBRO-VENDEJO

En libro-vendejo, viro rigardas libron, kies titolo estas: "Kiel eviti pagi impostojn".

La libro-vendisto vidas, ke la kliento estas interesata: La dua libro de tiu aŭtoro estos baldaŭ eldonita, li diras.

- Ah, kiu estas la titolo?
"Miaj dek jaroj en prizono!"

PERDO

Prostituino iras al kuracisto pri virinaj malsanoj. Li demandas:

- Ĉu vi perdas multe dum viaj mens-truoj?

- Ho jes, de 2000 ĝis 3000 eŭroj.

RIFUZO


Policisto haltigas aŭtomobiliston kaj petas lin spiri en la alkoholo-kontrolilon.

- Ne, mi rifuzas, vi ne havas kialon por devigi min!

- Do, diris la policisto, vi rifuzas? En tiu kazo, mi kalkulas ĝis tri.

Se, je tri, vi ne estos obeinta, mi mem blovos en la kontrolilon, kaj vi certe perdos almenaŭ 5 poentojn!

KIOM DA TRIANGULOJ?



SOLVOJ de la Krucvort-enigma de la numero 171

HORIZONTALE:

1. OKCIPITOST.
2. CI. KOD. BLE.
3. EDZO. URS.
4. ANONCLETER.
5. NAMOR. KREA.
6. OP. GASTU.
7. LIBR. KAKTO.
8. RALI. CON.
9. GRAFISM. NI.
10. IONI. MUMIO.

VERTIKALE:

1. OCEANOLOGI.
2. KIDNAPI. RO.
3. ZOM. BRAN.
4. IKONOGRAFI.
5. PO. CRA. LI.
6. IDUL. SKISM.
7. REKTA. MU.
8. OBSTRUKC.
9. SL. EE. TONI.
10. TETRAGONIO.

ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2016 ĝis 2018

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta $20 - 66\% = 6,80$ eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2015 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2016.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2015, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf duonkoste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2016	2017	2018
		Abono por la papera versio:	15 eŭroj	15 eŭroj	15 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
UEA	MG MJ(-T)	<ul style="list-style-type: none"> • Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado. • Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 29 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago). 			11 eŭroj 26 eŭroj 64 eŭroj
Pag- manieroj	1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio: <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:				
	2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de: <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al ktp por 2016, 2017				
	3. Por Germanio al nia peranto: Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)				
	4. Per internacia ĝiro je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY				

Marina (Sten Johansson) MONDIAL 2013

Jes ja, ŝi nomiĝas Marina. Kaj vi ankaŭ legos pri Tomas. Ambaŭ naskiĝis en la 70-aj jaroj kaj vi sekvos la rakonton ĝis la jaro 2007. La diversaj epizodoj de la romano disvolviĝas ĉefe en Svedio, sed inter aliaj landoj ankaŭ en Francio kaj eĉ Brazilo. La etoso ja devas esti internacia, ĉar la franca patro de Marina, kiu edziĝis kun la sveda patrino vizitas SAT-kongresojn kun sia familio. La rakonto ŝajnas tute ne virtuala, ĉar involviĝas diversaj katastrofoj vere okazintaj: vi certe ankoraŭ memoras pri la murdo de Olof Palme, la sveda ĉefministro, kolapsas la komunistaj ŝtatoj orienteŭropaj, ktp. Jen do kelkaj indikoj, kiuj signadas la itineron de Marina kaj Tomas sur la vojo al la alia kaj antaŭ ĉio al si mem! Istvan Ertl nomas la romanon moderna. Jesja, ĝi mergas la aktorojn en vivsituaĵojn, kiujn la aktuala socio plej vigle pridiskutas en ĉiuj amaskomunikiloj. Ege leginda verko. Kaj atentokapta. E. L.

Ŝtono de helpo (Hans Warren) Esperanto Kultura Servo Den Haag, 1989

La nederlanda aŭtoro Hans Warren estas tre konata kiel poe-

to, aŭtoro de taglibroj kaj literatura kritikisto. La rakonton *Ŝtono de helpo* tradukis Gerrit Berveling; ĝi aperis en 1989 kaj nia libroservo sukcesis ankoraŭ aĉeti kelkajn ekzemplerojn.

Nepre enprofundiĝu en la vivon de juda knabo persekutita de la nazioj kaj ŝirmita en nederlanda kamparana familio, kies tiamajn vivkondiĉojn vi malkovros. Oni povus kredi, ke tie li vivos sekure, sed iom post iom la 70-paĝa rakonto vin kuntenos en la plej malhelajn angulojn de la homaj karakteroj. Feliĉe sekreta amo. . . Ege atentokapta libreto! el

Skabio (Sten Johansson) MONDIAL 2015

Post *Marina* (2013) la eldonejo MONDIAL eldonis en 2015 duan romanon de Sten Johansson, la krimromanon *Skabio*. Imagu viron enfermitan en policeja ĉelo pro akuzo de murdo. Ĉu li vere murdis iun? Sciu almenaŭ, ke solula plurtagnokta restado en tia lokaĉo disponigas la necesajn horojn kaj tagojn por rememori pri sia ĝisnuna vivo, iom post iom ĝis la junaĝo, kiam la gepatroj malzorgis pri la knabo! Tiel ankaŭ vi malkovros vivhistorion ne ĉiam feliĉegan. EL

Nos cotisations 2016

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2015. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2016 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2016 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés et/ou nos membres.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT ?

1. Association Régionale ESPÉRANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse. *Ex. Abono Inf + kotizo 2016 por 756*
 - par chèque bancaire à l'ordre de **Espéranto France-Est**, mais adressé à notre trésorier:
S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
 - Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse. Indiquer votre adresse courriel pour l'abonnement version pdf.
- Nova** • Une cotisation fédérale de 20 euros vous est proposée. Elle permet de déduire 66% des impôts. Ainsi vous n'aurez payé que $20 - 66\% = 6,80$ euros, mais notre association aura reçu 20 euros.

Abonnement et cotisation pour les années:	2016	2017	2018
Abonnement à La INFORMILO version papier	15 €	15 €	15 €
Abonnement à La INFORMILO version internet (format pdf)	7,5 €	7,5 €	7,5 €
Adhésion à l'Association Espéranto France-Est (à rajouter à l'abonnement)			
• <i>Cotisation fédérale</i>	7 €	7 €	7 €
• <i>Cotisation fédérale de soutien avec reçu fiscal pour bénéficier de 66% de réduction d'impôt</i>	20 €	20 €	20 €

2. Association Internationale UEA (cotisations 2016)

Les cotisations à l'UEA peuvent être payées directement à notre association Espéranto France-Est par l'intermédiaire de notre trésorier S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM qui transmettra dans les meilleurs délais.

Veuillez noter le code de la cotisation que vous payez. (cotisation UEA MA)

UEA			
UEA	• Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	MG	11 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA	MJ	26 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30 ans)	MJ-T	26 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO	MA	64 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	MA-T	64 €

3. Association Nationale Espéranto-France (UFE) (cotisations 2016)

Les cotisations à l'UFE sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 85535D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2015 de l'UFE. **Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.**

Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.

UFE		
UFE	• Membre actif d'Espéranto-France (avec reçu fiscal)	39 €
	• Membre actif d'Espéranto-France et d'Espéranto-Jeunes. (moins de 30 ans au 1.1.2016)	30 €
	• Tarif réduit pour étudiants, chômeurs	15 €
	• Première année	10 €
	• Cotisation pour un couple (avec reçu fiscal)	78 €
	Abonnement au magazine bimestriel Le Monde de l'espéranto.	+18 €

IMPORTANT

- 1) Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association.
- 2) Les cartes de membre de l'année 2016 et éventuellement de l'année 2017 seront envoyés aux autres membres d'**ESPERANTO FRANCE-EST** par courrier séparé avec des informations spécifiques réservées aux membres ou inclus dans l'envoi du bulletin La Informilo.
- 3) Les membres payant une cotisation fédérale de soutien ou un don en 2015 recevront un reçu fiscal pour bénéficier de 66% de réduction d'impôt pour la déclaration à faire en 2016.

La 88-a SAT-KONGRESO 8-15. 8. 2015

Okazis en la slovakia urbo Nitra situanta 90 km for de la ĉefurbo Bratislava. La eventon partoprenis pli ol kvindeko da esperantistoj el dek ok landoj. La plej foraj kongresanoj alvenis el Aŭstralio, Argentino, Ĉinio, Japanio, Koreio, Madadaskaro kaj Usono. Inter la partoprenantoj estis pluraj gejunuloj, kiuj aktive intervenis kaj kontribuis al la programo.

Bonvenigis nin la ĉeforganizanto de la kongreso Peter Baláž. La kongresejo troviĝis en la universitata student-hejmo “Anton Bernolák”. En la akceptejo estis instalitaj tri libroservoj, surmure ekspoziciitaj glumarkoj kaj E-bildkartoj el privata kolekto. Ĉe alia flanko pendis pluraj T-ĉemizoj kaj sur la tabloj kuŝis aliaj esperantaĵoj por vendado. En apuda ĉambro ni admiris ekspozicion de diversspecaj bildoj.

Antaŭ la inaŭguro oni prezentis kelkajn rimarkindajn ĵus eldonitajn librojn de la SAT-eldonejo, de la hispana Sateh kaj Peter Baláž prezentis sian kolekton. Poste oni legis kelkajn salutmesaĝojn. La organizanto prezentis skize la programon de la semajno. Dum la kongreso okazis kvar laborkunsidoj, socialaj forumoj pri Grekio, Usono, Latin-Ameriko, Mezoriento kaj Orienta Azio, raportoj pri laborgrupoj kaj jarraportoj. Kunvenis liberecanoj, komunistoj, sennaciistoj, vegetaranoj, verduloj, LEA-komitato. Ni estis informitaj pri Vikipedio, pri pretigado kaj farado de Sennaciulo, pri PIV, pri programo kaj planoj de E@I. Stano Marček prelegis pri fungoj kaj informis pri siaj lernolibroj *Esperanto per rekta metodo*. Pri la familio kaj la verkoj de la fratoj Josef kaj Karel Čapek parolis Petr Chrdle. Aldoniĝis prelego pri ŝovinismo prezentita de Johan Derks. Kun Peter Baláž oni diskutis pri la temo *Ĉu ni pretas je grandaj ŝanĝoj*. Estis ellaborita kaj akceptita la Gvidrezolucio, en kiu oni krom aliaj gravaj punktoj substrekas la neceson respekti la liberon de penso kaj la privatecon de la homaro.

Dum la unua duontaga ekskurso ni promenis tra la urbo Nitra piede kaj trajnete ĝis la katedralo. Ni vizitis ĝin kaj poste ni gustumis la mezepokajn trinkaĵojn preparitajn surbaze de herboj kaj kafon el glanoj spicitan per cinamo kaj kariofilo. Poste ni vizitis sinagogon, kiu nuntempe utilas kiel koncertejo. Kontraŭ ĝi en bele ekipita teejo ni gustumis kelkajn specialajn teojn kaj kuketojn. Nia japana samideanino Hideko Huĝimoto sukcese prezentis kaj parolis pri la teo-ceremonio laŭ japana maniero. La dua duontaga ekskurso kondukis nin al urbo Topolčianky, kie ni vizitis ĉevalojn. Tie oni bredas plurajn rasojn de ĉevaloj. Inter ili troviĝas ĉevalo, simbole donacita al la brita reĝino Elizabeth II dum ŝia vizito en Slovakio la 24-an de oktobro 2008. La reĝino kontribuas al ties zorgado kaj oni povas rimarki, ke la “reĝa” ĉevalo estas pli bone prizorgata ol la aliaj. Poste ni vizitis burgon de la 15-a jarcento. Ĝi estas nacia kultura heredaĵo. Laste ni vizitis la vinproduktejon sen la promesita gustumado.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la historia urbo en meza Slovakio Banská Štiavnica. Ĝi estas konata pro minado de metaloj, ĉefe de arĝento. Unue ni vizitis la mineralogian ekspozicion kun multegaj, diversformaj kaj raraj belkoloraj ŝtonetoj. Post la tagmanĝo ni vizitis la minejon. Ekipitaj per kaskoj, mantelo kaj lanterno ni subteriĝis kaj paŝadis tra malhelaj koridoroj de la eksa minejo imagante la pezan laboron de tiamaj ministoj. La urbo estas enskribita en la Unesko-listo de kulturaj heredaĵoj. En ĝi troviĝas la plej granda kripo *Banskoštiavnický Betlehem*, kiun kelkaj el ni ankaŭ vizitis.

Vesperaj kulturaj programoj konsistis el prezento de slovakia popolmuziko, vingustumado kaj dancado, filmoj “Civitano 4” kaj “Ni ne plu estu sklavoj”. Teatraĵon R.U.R. prezentis studentoj el la urbo Svitavy. Koncertis por ni la muzikgrupo “No problem” el Ĉeĥio kaj Attila Schimmer el Aŭstrio regalis nin per kantoj el sia repertuaro kaj akrobataĵoj. Dum la adiaŭa vespero ni aŭskultis kantojn, gitarludadon kaj s-ino Tahira Masako el Japanio sukcese aŭkciis kelkajn esperantaĵojn. La kongreso bone sukcesis malgraŭ la sufoka tropika vetero.

La venontjara SAT-kongreso okazos en Herzberg am Harz - La Esperanto-urbo de la 16-a ĝis la 23-a de julio 2016.

78a regiona staĝo kaj 37-a BAVELO-Seminario okazinta de la 16a ĝis la 18a Oktobro 2015 en Pforzheim

Refoje funkciis la reciproka kunlaboro inter EFE kaj Bavelo por la aŭtuna staĝo en Pforzheim.

Ĝi sam-okaze ebligas interŝanĝi spertojn pri la organizado kaj eĉ pri la instruado de Esperanto.

Ginette bonvolis raporti pri ĝi kaj pri siaj travivaĵoj.



La loko elektita por la seminario estis ege bela, situanta en agrabla junuldomo konstruita sur ruinoj de malnova kastelo. La konstruaĵo estis impona, pli alta ol larĝa, sed la moderna komforto kaj la liftoj tute ravis min.

Venis trideko da partoprenantoj, la malgranda nombro ne malhelpis tre bonan etoson kaj ĝojgajn momentojn.

La nutraĵo estis abunda, diversa kaj sana, sed kelkfoje mankis pano en la menuo, la francoj kutimas nutri sin per ĝi, kiu alportas malrapidajn sukerojn.

Pri la programo mem: La turismaj aranĝoj estis multaj kaj tre valoraj, sed mi parolos nur pri la vizito en besto-ĝardeno, en kiu mi partoprenis. La parko estas tre bela natura loko, kun multege da belegaj gigantaj arboj. Troviĝas sovaĝaj bestoj kiel ursoj, cervoj, sovaĝaj katoj, linkoj, aproj, otusoj, lutroj, sed ankaŭ tre plaĉas la simplaj farmbestoj kiel kunikloj, porketoj kiuj vagas inter la spektantoj kaj kokoj kaj kokinoj. La spektaklo de la kokidoj, kiuj rifuĝas sub la



flugilojn de la kokino ravas la infanojn, kiujn ne kutimas vidi tion. La vizito estas senpaga, krom 5 eŭroj por parkado de aŭtomobilo, sed la malgrandaj infanoj ŝatas nutri la bestojn per diversaj grajnoj aĉetitaj de la gepatroj, tio helpas al la financado de la besto-ĝardeno.



Pri la distraj vesperoj: Vendrede vespere, ni interrilatis grupete laŭ nia monato de naskiĝo kaj ni devis prezenti nin reciproke. Poste okazis interesa ludo: membro de skipo ricevis papereton, sur kiu estis skribita vorto. Li/ŝi devis desegni per muso de komputilo, kaj la desegno aperis sur mura ekrano; la aliaj membroj de tiu skipo devis ene de tri minutoj trovi la temon de la desegno kaj, se jes, ili gajnis unu poenton. La rivala skipo estis informita pri la ilustranda vorto, do ili profitis la ludon sen cerbumi. Poste oni interŝanĝis la skipojn kaj la ludantojn. La amuza flanko de la afero estas, ke la muso ne bone obeis la fingrojn de la ludanto, kaj tio kreis hezitojn en interpretado kaj ridojn.



Sabate vespere, la distra vespero estis dediĉita al kantoj en esperanto, kiujn Rotraut afable ĉarme gvidis per sia gitaro.

Pri la pedagogiaj partoj: La temo estis: lerni-instrui-ĝui. Intervenis Alois Eder kaj Martin Ptakinski

Sabate matene, ni cerbumis pri varbado:

1- Kiel ni argumentas, kiam ni parolas pri esperanto

2- Teatro: Imagu ke vi parolas al iu persono dum atendado de buso (amuza)

3-Dimanĉe matene, ĉiu el ni devis diri, kiel ni funkcias, aŭ funkcius,

kun lernantoj. Ĉar plejparte el ni estis instruantoj de Esperanto, ofte kun nana grupo, la rakontoj pri personaj spertoj estis tre interesaj, kaj elmontris ĝeneralan adaptiĝon al la lernantoj.

Kelkaj bonaj konsiloj estis donitaj: Neniam instruu verbon sen la komplemento; parigu frazojn kun "estas" kaj "mi vidas" por la uzo de la akuzativo. Oni ankaŭ donis al ni liston de utilaj libroj.

Por ne forgesi ilin: Ankaŭ gvidis la tutan renkonton: Edmilson Lima Se-rejo, Johannes Muller, Ursula Niersert, Inge Simon, Cornelia Majer.

Notindas la veno de Sebastain Kirf, kiu rakontis pri sia laboro en la nova centro de GEA en Berlino.

Tre mirigis min la bona nivelo en esperanto de iu viro, kiu ĵus lernis esperanton per la programo duolingvo, dum nur kelkaj monatoj.

Li parolis malrapide sed efike, klare, kaj komprenis preskaŭ ĉiujn niajn dirojn.

Li diris: Mi lernis la lingvon, sed mi ne vidas utilon en la movado.

Mi ŝerce diris: Ĉu vi scias, ke la esperantistoj vivas pli longe ol la aliaj homoj?

Li respondis: Ho, ili atendas la finan venkon?? Mi ridis kaj diris: Eble jes!

Ginette Martin



Insiste: Krimeo estas nia-La Crimée est à nous de Kalle Kniivillä (Aŭtoro/jurnalisto proe premiita en sia lando)

Libro vere leginda! Aperinta en la sveda, la finna kaj Esperanto. La enketisto uzis la rusan kaj Esperanton por sia esplorado sur la insulo. La esperanta versio estas disponebla en la LIBROSERVO de EFE.

L'annexion de la Crimée par la Russie en mars 2014 a profondément secoué la politique mondiale. La crise en Crimée reste une bombe à retardement, dont toutes les conséquences ne sont pas encore prévisibles.

L'annexion est aussi une question qui divise la population. Le salaire versé par l'état à Anna à Sébastopol a été doublé après l'annexion. Elle a pu acheter la belle armoire de cuisine blanche, à laquelle elle avait longtemps rêvé, mais par ailleurs presque tout reste comme auparavant. Dans son arrondissement on souhaite la bienvenue à Poutine. Pour Anna, la Russie est l'héritière directe de la bonne Union Soviétique, dans laquelle elle a grandi.

Ce n'est pas la même chose pour Eskender. Il a rencontré les nouveaux potentats, lorsque des policiers lourdement armés ont frappé à sa porte et ont tout renversé dans l'appartement. Eskender est un tatar de Crimée; pour lui la Russie est l'héritière directe de la mauvaise Union Soviétique qui a chassé tout son peuple hors de Crimée.

Kalle Kniivillä a voyagé en Crimée et a rencontré des hommes aux points de vue très différents. L'annexion a réveillé d'anciennes blessures et a établi de nouvelles lignes de conflit entre les Criméens. De nombreux habitants de Crimée aspiraient à un changement-mais celui-ci est-il le changement qu'ils désiraient?

traduit en français par Catherine ROUX-HARELLE avec l'aide de Ginette MARTIN

La 23-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO ROSES 3 -10. de oktobro 2015


Ekzistas nun en Esperantio kelkaj feriaj semajnoj en Germanio, suda Francio kaj en Katalunio. Ili allogas samideanojn por kune ferii, turismadi kaj samtempe ĝui agrablan esperanto-etoson. Tiel de jaro al jaro fariĝis jam tradicio renkontiĝi kun geamikoj, konatiĝi kun novaj partoprenantoj. En Katalunio ni ankaŭ rendevuas kun agrabla somer-fina vetero. Jen raportas pri ĝi Liba Gabalda.



La aranĝo okazas ĉiujare aŭtune en Katalunio. Ĉi-foje ni ĝuis ĝin en la ĉe-mara urbo Roses (hispane Rosas), kiu situas tute proksime al la franca limo. La urbo estas grava turisma kaj kultura centro kun hoteloj, plaĝoj kaj du havenoj. Unu utilas por la fiŝkaptado kaj alia por la plezuro, kie en kanaloj navigas privataj ŝipoj. En Roses troviĝas ankaŭ pluraj antikvaj konstruaĵoj, inter kiuj estas unika historia citadelo.

La eventon partoprenis 98 esperantistoj el 13 landoj. Ni loĝis en komforta tristela hotelo "Sant Marco", kie ni bone manĝis kaj ĉiuvespere eblis danci ĝis la noktomezo. Por niaj ĉiutagaj aktivaĵoj ni havis je dispono grandan salonon. En la inaŭguro ni havis la plezuron bonvenigi la urbestrinon de Roses s-inon Montse Mindam. Ŝi adresis al ni agrablajn vortojn kaj bondeziris sukcesan E-Semajnon.

Ŝi ankaŭ menciis, ke en la fora pasinteco en la urbo jam ekzistis esperantista grupo.



Dum la semajno okazis pluraj interesaj prelegoj, debatoj kaj diskutoj. Kun Dalia Pi-leckiene el Litovio ni lernis kiel mastrumi nian tempon. Alian tagon ni alfrontis iom komplikan temon, kiun ni devis solvi el psikologia vidpunkto. Gesinjoroj Perla Martinnelli kaj Giorgio Silfer el Svislando prezentis la libron "Historio de la esperanta literaturo". Giorgio verkis ĝin komune kun Carlo Minnaja. Interesatoj povis aĉeti ĝin surloke. Alia ilia prelego temis pri ENA (Esperanto Natur-Amikaro). Ni akiris informojn pri ilia laboro kaj pri la estontaj planoj. Marcel Delforge el Belgio parolis pri la historio de Neŭtrala Moresnet, kie estis fondita kaj iom da tempo ekzistis Esperanto-Amikejo. Gesinjoroj Buŝs el Latvio prezentis verkojn de la latva poeto Imants Ziedonis. Prelego de Luis Serrano temis "Ĉu malaperos nia planedo Tero?" Tio estas pripensenda temo. . .



Vespere ni ĝuis du interkoniĝojn kun vino kaj dolĉaĵoj. Bonan etoson kreis la folkloro grupo "Montjuic", kiu ĝojigis nin per belaj kantoj



"Habaneras". Ne mankis nia ŝatata "cremat" -bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj. Unu vespero estis dediĉita al opero. Laŭ propono de Maria Ferigle ni spektis sur ekrano operon de la itala komponisto Giacomo Puccini "Madame Butterfly".



La premio "Ada Sikorska" estis atribuita al la pola blinda poetino kaj prozverkistino Halina Kuropatnicka-Salamon pro ŝia meritplena poresperanta



Fotoj de Andreo



laboro. La prestiĝan premion oni jam pli frue sendis al ŝi okaze de festa renkontiĝo. Sino Halina estis tre kortuŝita kaj sendis dankleteron al s-ro Luis Serrano. Kiel jam konate Rodica Todor el Rumanio ĉiam proponas interesan instruprogramon. Ĉi-

foje ni debatis pri strategioj de komunikado en homaj interrilatoj. Ni laboris en grupoj kaj alfrontis diversajn temojn. Ekzemple, konfliktoj inter generacioj, diversaj grupoj, asocioj ktp. Aktuala situacio pri enmigrintoj ankaŭ estis traktita. La temoj estis tre vastaj kaj ni vigle diskutis, donis niajn opiniojn, analizis kaj provis trovi pozitivaĵojn en diversaj situacioj. Aparte ŝi organizis paroligan kurson por komencantoj.

Okazis ankaŭ ekskursoj. Dum la duontaga ekskurso ni vizitis urbeton L'Escala, kie ni en fabrikejo vidis prilaboradon de anĉovoj. Poste ni gustumis ilin. Kompreneble, ne mankis aĉeteblo. En la urbo Roses ni vizitis lokan muzeon kaj citadelon de la 17-a jarcento kun grekaj kaj romiaj restaĵoj.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la proksima urbo Figueres. Unue ni vizitis la kastelon Ferran kaj poste la faman muzeon de Dali. Posttagmeze ni daŭrigis nian busvojaĝon ĝis la urbeto Banyoles. Tie ni restis dum kelkaj horoj ĉe la lago. Eblis ŝippromeni sur ĝi aŭ uzi turisman trajneton por traveturado de la urbo. Iuj tutsimble piedpromenis laŭ la bordo de la lago. Post agrabla kafumado kaj biertrinkado ni revenis kontentaj al Roses.

Lastan vesperon Luis Serrano lanĉis debaton pri funkciado de la Semajno. Partoprenantoj



estis plejparte kontentaj. Nur la alveno al Roses estis ĉi-foje iom pli komplika ol kutime pro neekzisto de trajno ĝis tie. Ni promesis veni denove venontjare. Tiam Luis, la ĉeforganizanto festos sian 90-jariĝon. Do, ni deziras al li kuraĝon kaj sukceson!!!





Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda